

# ESPERANTO PROVENCE

Numero 88 - Printempo 2012

4 numeroj/jare



redaktoro:

Pascal Vilain

[p.vilain83@orange.fr](mailto:p.vilain83@orange.fr)

61 montée du Castelar

83460 TARADEAU

kasisto:

Michel Cerisay

[mcerisay@gmail.com](mailto:mcerisay@gmail.com)

15 Place des Vents Provençaux

13140 MIRAMAS

## VORTO DE LA PREZIDANTO

Denove, ni povas dankegi la grupon de Saint-Raphaël pro la sukcesa Mediteranea Esperanto-Semajno, kiu disvolviĝis en siaj novaj lokoj en Les Issambres. Eĉ belega vetero akompanis nin dum la tuta staĝo ! Nuraj bemoloj en tiu sukceso bedaŭrinde estis la hospitaligo de Monique Prezioso, kiun feliĉe ni tamen vidis la lastan tagon, kaj malsano de pluraj partoprenantoj kaj kursgvidantoj.

Nun, ni plu pensu pri Esperanto : ĉiam malkovrigi kaj

lernigi ĝin !

Ne forgesu nian ĝeneralan kunvenon en Romans, fine de Junio. Mi esperas multnombrajn partoprenantojn de nia regiono, okaze de tiu escepta evento, kiu nektive kunigos samideanojn el la Rhône-Alpes kaj P.A.C.A.-federacioj.

*Pierre Oliva*

## VIVO DE NIAJ FEDERACIAJ ASOCIOJ

### 04 - Esperanta Kulturo en Manosque

#### Staĝo

Krom la regulaj kursoj (vidu en n° 87), staĝo estis organizita la 17an de Marto, de la 9a30 ĝis la 18a horo.

#### Nova ZEO

Laŭ decido de la urba konsilantaro, estas nun nova Zamenhof/Esperanto-Objekto en Manosque : « bushaltejo Zamenhof », en la kvartalo "Le Forum", apud la strato L.L.Zamenhof. Eblas danki la urbestron, M. Bernard Jeanmet-Peralta, je tiu retadreso : [mairie@ville-manosque.fr](mailto:mairie@ville-manosque.fr)

*informis José Grammatico*

derlando, Hispanio, Pollando, Anglio, Rusio, Italio, Danlando, Kanado kaj Malio. Inter ili, 52 infanoj kaj adoleskantoj !

Kvankam ni antaŭvidis tiun aranĝon pli familia, ni povis ĝui buntan programon : 21 prelegoj, trinivelaj Esperanto- kursoj, vizito de bierfarejo kaj multege da aktivecoj, kiuj kontentigis ĉies gustojn kaj ĉiujn aĝojn. Kia elekteleco en ĉarma etoso !

Por gesportistoj : kurado, gimnastiko, Tibetaj korpekzercoj.



*Sinprezento de la atelieraj geresponsuloj*

### 13 - Espéranto - La Ciotat

#### Novjara Renkontiĝo

Nicole kaj mi partoprenis jarfine en la 10-a NoRo (Novjara Renkontiĝo), en la germana urbo Bitburg, de la 27a de Decembro ĝis la 3a de Januaro.

Ĉeestis 145 partoprenantoj, el kiuj gesamideanoj el Aŭstrio, Svislando, Francio, Luksemburgio, Belgio, Ne-

Por geartistoj : kantado (4 atelieroj el kiuj unu pri ĥoro), dancado (4), ĵonglado, teatro, pupteatro, filmkreada « Holivudeto », piĝamaj rakontoj.

Plie, multaj manlaboraj atelieroj : fadeno-

feltumado, trikourso, paperfaldo, scienca konstruado de tempohorloĝo kaj aŭto pelita per helico kaj gumomotoro.

Por geintelektuloj : skribateliero, sorobano, budaismaj meditado kaj filozofio. Ni ne forgesu filmajn projekciojn, subtilajn societajn ludojn, la gajegan silvestran balon kun bongustega bufedo, la adiaŭan vesperon, kiam infanoj kaj plenkreskuloj montris siajn talentojn praktikitajn dum la semajno.

Danke al ĉio tio, ni tute forgesis la grizan kaj frostan veteron de la germana vintro. Kora varmo sufiĉis.

*raportis Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva*

### **Bicikla mondvojaĝo**

Alain Rémy, kiu jam biciklis tien-reen al Ĉinio kaj Vjetnamio, denove startis por ĉirkaŭmonda biciklado, sabate la 25an de Februaro je la 9a, en La Ciotat.

Pluraj samideanoj estis en La Ciotat tiun matenon por saluti lin antaŭ lia foriro.

Eblas sekvi liajn aventurojn ĉe :

<http://unmondedeuxroues.blog.free.fr>

*informis Renée Triolle*



*Ĵus antaŭ la foriro*

### **13 - Espéranto – La Roque**

Kursoj regule okazas en La Roque d'Anthéron, marde kaj merkrede, de la 15a ĝis la 16a30, en la Domo de la Asocioj.

### **83 - Eo-Klubo de Fréjus-Saint-Raphaël Reĝkuka festo**

La 22an de Januaro, je la 12a, deko da esperantistoj de la loka grupo, al kiuj aldoniĝis kelkaj geamikoj el najbaraj urboj, renkontiĝis ĉe Monik' kaj Pjero Prezioso.

Post komuna tagmeza manĝado alvenis aliaj gesamideanoj por la tradicia reĝkuko.

Je la 15a okazis ĝenerala membrokunveno de la asocio kun legado de la diversaj raportoj (aktiva, morala, financa). Ĉiuj estis akceptitaj.

La ĉeestantoj ankaŭ diskutis pri diversaj problemoj, specife por plibonigi la informadon al membroj kaj la konatigon de nia Esperanta movado en la Provenca regiono.

*raportis Gilbert Duval*



### **Mediterranea Esperanto-Semajno**

Kiel ĉiujare okazis la nun tradicia M.E.S, kiu inaŭguris sian novan lokon en Les Issambres. Se ne estus la bedaŭrinda hospitaligo de Monique Prezioso (al kiu ni deziras rapidan kaj kompletan resaniĝon) kaj la malsano de multaj partoprenantoj, eblus diri, ke tiu staĝo, plian fojon, estis vera sukceso.

Cetere, kelkaj staĝintoj emis esprimi sin pri tiu semajno. Jen iliaj tekstoj :

Ĉi-jare, Les Issambres anstataŭas Agay. La grupo konsistas el 87 partoprenantoj de 10 naciecoj : belga, ĉeĥa, finna, franca, germana, itala, hispana, hungara, sveda kaj svisa. Tio gravegas, ĉar laŭ mi, kiu estas francino, renkonti eksterlandanojn ebligas interŝanĝi pri malsamaj kulturoj kaj aŭdi plurajn akĉentojn.

Por mi, tiu semajno estas ne nur Esperanta staĝo sed ankaŭ ferioj. Imagu ! Nura Esperanto-semajnfino similas por mi al tri feriaj semajnoj, do plena semajno kvazaŭas tri feriajn monatojn. Sed ŝs ! Ne diru tion al mia direktoro !

La dimanĉon 26an de Februaro, mi partoprenas la kunvenon de la federacia estraro de Eo-Provence. Vespere spektaklas la ĝoja « Mado des Issambres ». Florine kaj Aurélie kantas la lundon vespere. Ili estas vere mirindegaj artistoj.

El mia ĉambro, mi ĝuas marvidaĵon. Mi praktikas jogon sur la balkono rigardante la maron. Kia plezuro ! Dank'al Hubert mi ĉeestas privatan prelegon pri Dali mardon vespere.

Merkrede mi ŝipas ĝis St-Tropez. Mi vizitas la muzeon « L'Annonciade », kie mi multe aprezas la pentraĵojn de Paul Signac. Kun Jean-Pierre Schneider, mi prizorgas la libroservon de « Réinsertion et Espéranto ». Ni profitas la okazon por ankaŭ organizi kunvenon de tiu asocio, vendredon posttagmeze.

Oho ! Mi preskaŭ forgesas la plej gravan ! En la restoracio, ĉiutage atendas nin granda bufedo. Ĉiu, ankaŭ la vegetaranoj, povas elekti kion li aŭ ŝi deziras.

Sed la tempo forflugas. Bedaŭrinde estas sabato kaj ni tuj foriros : ni do adiaŭas. Mi deziras ne forgesi la revigligan etoson kiu helpas min reveni pli forta kaj pli serena en miajn vivo, laboro...

*Claudie Demongeot (Francio)*



*Parto de la partoprenantoj, dum la inaŭgura vespero*

Jam la 6-an fojon okazis en Francio ĉe la Mediteranea maro la Esperanto-Semajno.

Organizas ĝin Monique Prezioso kaj Christine Graissaguel el la E-grupo de "Saint-Raphaël".

Antaŭajn jarojn ĝi okazis en la urbo "Agay" kaj ĉi-jare oni elektis la rezidejon de "Vacancel" ĉe la marbordo de "Les Issambres". Ĝi troviĝas inter la urboj "Fréjus" kaj "Saint-Tropez".

La eventon partoprenis ĉirkaŭ cent geesperantistoj, precipe francoj, sed venis gastoj el aliaj eŭropaj landoj : Belgio, Ĉeĥio, Finnlando, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Svedio kaj Svislando. La aranĝo okazis en luksa apudmara hotelo, kie en la pasinteco feris miliarduloj. Post ilia foriro ĝi estis transformita en libertempan restadejon kun bele aranĝita parko.

Al ĝi ankaŭ apartenas kelkaj komfortaj dometoj situitaj sur monteto. En apuda konstruaĵo okazis ĉiuj

aktivaĵoj de la semajno.

Matene kaj vespere, antaŭ la manĝoj, okazis E-kursoj de diversaj niveloj. Ni povis pliprofundigi niajn sciojn pri la historio, perfektigi la E-lingvon kaj ĉefe la gramatikon. Instruis Perlo Miela el Hungario, Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar el Germanio, Pascal Vilain kun sia edzino Mari-Roza kaj Daniel Moirand el Francio. Bone funkciis ankaŭ la libroservo.

Posttagmezoj estis liberaj kaj ĉiu povis elekti sian aktivaĵon. La bela naturo kun florantaj kaj bonodorantaj mimozfloroj logis al montaraj aŭ ĉemaraj promenoj. Pluraj el ni vizitis pli malproksiman ĉirkaŭaĵon peraŭte aŭ buse. Merkredon posttagmeze ni ŝipveturis al la famkonata (pro la filmoj pri Ĝendarmoj) apudmara somerrestadejo "Saint-Tropez". De la maro ni vidis luksajn domojn kaj vilaojn de konataj francaj aktoroj, artistoj, kantistoj kaj de aliaj milionuloj.

Post agrabla promenado en la pitoreska urbo ni revenis al "Les Issambres".

Vespere ni povis ĝui programerojn de la hotelo (kabaredon, kantadon, maskobalon...) kaj ankaŭ la niajn. Peter kaj Zsófia prezentis al ni la Esperanto-urbon "Herzberg" en kiu ili vivas kaj aktivis. Ili invitis la ĉeestantojn al la fervojista kongreso, kiu okazos tie en Majo. La geedza paro Hubert kaj Michèle el Belgio prezentis siajn E-aktivaĵojn dum la jaro 2011. Saliko el Finnlando parolis pri sia lando kaj ties kutimoj. Jean-François el Francio prezentis unikan filmon pri sia vojaĝo al Sumatro kaj siaj tieaj aventuroj. La lasta vendreda vespero estis dediĉita al prezentoj de la partoprenantoj. Ni aŭdis kantojn, poemojn, skeĉojn, humuraĵojn kaj fine oni ankaŭ invitis al dancado en akompano de akordionoj. La etoso estis gaja kaj agrabla. Sabaton matene okazis lastaj kursoj kaj post la tagmanĝo ĉiuj disiĝis al siaj hejmoj. Ni ĝuis agrablan semajnon en bela regiono de suda Francio, kie abundis florantaj mimozoj.

*Liba Gabalda (Ĉeĥio/Francio)*

Aliaj raportoj pri la M.E.S.  
sekvos en la venonta numero.

---

### Ontaj eventoj

La klubo de Fréjus-Saint-Raphaël proponas al vi du renkontiĝojn en Majo kaj Julio : vidu en la rubriko « Venontaj rendevuoj ».

## AGADO DE IZOLITAJ GEFEDERACIANOJ

### Nice (06)

#### Vizito de du esperantistoj

Plezure, ni akceptis hejme en Nico, de la 23a ĝis la 25a de Februaro, du samideanojn el la germana Esperanto-urbo Herzberg am Harz, Zsófia Kóródy kaj Petro Zilvar, de la I.C.H. (Interkultura Centro Herzberg), veninte aviadile de Berlino kaj devonte poste gvidi kursojn en la M.E.S. (Mediterranea Esperanto-Semajno).

Ni bonvenigis ilin sub brila suno, kiun ni mendis de la lazura ĉielo.

Kvankam ili estas ne angloj, sed respektive hungarino kaj germano, ilia unua tago estis dediĉita al promenado sur loko nomita "La Promenejo de la Angloj".

Kiom ili miris, vidante niajn palmojn kaj mimozojn, tiujn plantojn, kiuj devenas el Afriko kaj Aŭstralio ! Kaj imagu ilian pluan miron, kiam ili vidis la olivarbojn kaj ĉefe la citronarbojn !

La sekvan tagon, ni proponis piedekskurson tra la Olda Nico kaj ĝiaj mirindaĵoj.

Du tagojn poste, Zsófia kaj Petro foriris trajne al Saint-Raphaël, antaŭ ol iri ĝis Les Issambres, sen tro da malĝojo, ĉar estis antaŭvidite, ke ili retrovos nin en la staĝejo la sekvan tagon, dimanĉe.

*raportis Gilles Wallez*

#### Ree aktiva samideano

Yanpetro Kavlan (alinome Jean-Pierre Cavelan), Nicano, sciigis per mesaĝo, ke li ree aktivas en la Esperanto-medio.

Li apartenas al Esperanto-familio : liaj gepatroj kaj frato Michel estis tre agemaj esperantistoj.

Retejoj liaj :

<http://www.facebook.com/jeanpierre.cavelan>

<https://sites.google.com/site/kunikslakuniklo/>

### Belcodène (13)

#### Esperanto-leciono en lernejo

16a de Februaro. Ĵaŭdo.

Tiu tago estas grava por mi. Kial ? Ĉar mi akceptas du kuraĝajn Eo-geinstruantojn, Mari-Roza kaj Pascal Vilain, en mia vilaĝeto Belcodène (Bouches-du-Rhône), sufiĉe malproksima al ilia loĝejo de Taradeau (Var).

Je la naŭa, instruistino de la vilaĝa lernejo, al kiu mi proponis Eo-lecionon, prezentas nin al siaj 27 gelernejanoj de CM2, kiuj rideteme nin rigardas.

Komence, Pascal prezentas sin Esperante ; sekve,

Mari-Roza kaj mi same faras.

- En kiu lingvo mi parolas ?

- La provenca ? la angla ? la germana ?... ktp. Ilia instruistino nenion antaŭe diris pri Esperanto, kies nomon ili do ne konas.

La parolado plivigliĝas, kelkaj ridoj ekas.

Pascal prezentas la lingvon, parolante pri ĝiaj kreinto, internacieco, aĝo (juna lingvo, nur 125jara). Li kompare klarigas la aĝon de la franca, ŝanĝigante la jarojn en jarcentojn kaj jarmilojn... ktp. Li ĉiam provas adapti sian prezentadon al la klasa komprennivelo.

Poste, ni disdonas po unu koverton al la infanoj.

Memkreita triĉela koverto ; en ĝi : bildetoj, nomoj



*en la CM2-klaso de la lernejo de Belcodène*

(kato, muso, tablo, lito, suno, luno, rozo, tulipo... ), koloradjektivoj (ruĝa, nigra...) kaj la verbo "estas".

La lernejanoj malkovras, ludas per la vortoj... Ankaŭ ilia instruistino, kiu notas multajn informojn dum la Esperanta leciono. Ĉiuj partoprenas entuziasme, kreas frazojn kaj prononcas ilin laŭtvoĉe.

Pere de la kreitaj frazoj, ili eĉ kantas laŭ la melodio « Frère Jacques » :

« *Nigra kato, nigra kato, estas ĝi, estas ĝi, kato estas besto, kato estas besto, besto jes, besto jes.* »

(Kaj ankaŭ : ruĝa pomo, flava suno, blanka luno... )

Jen estas tempo por nova ekzerco : pliaj bildoj, pliaj vortoj eliras el la koverto : dragono, sorĉistino, knabo, heliko... granda, bela, forta, alta... trovu sian parduonon aŭ mal-vorton.

La instruistino kontrolas interese la laboron de siaj gajaj gelernantoj.

Dum la tuta leciono, ili malkovras ankaŭ la prononcon de la nekonataj literoj ĉapelitaj, kelkajn prefiksojn kaj sufiksojn.

Sed jam estas la paŭzo-tempo, fino de nia interveno.

Ni interŝanĝas retadresojn kaj « ĝisrevidas», feliĉaj pri tiu agrabla momento pasigita en la klasĉambro.

Morgaŭ, la infanoj iros al la vilaĝa biblioteko, kun sia instruistino, por vidi ekspozicion pri Esperanto. Ankaŭ mi iros por helpi kaj respondi la demandojn de la gelernantoj pri mia ŝatata lingvo.

Alia bela tago estas venonta !

17a de Februaro. Vendredo.

Je la naŭa, la infanoj eniras en la bibliotekon. Tiu bela, granda, nova konstruaĵo unuetaĝa troviĝas proksime de la lernejo.

La gelernantoj disiĝas por rigardi la ekspoziciajn panelojn, kiuj fakte estas destinitaj al pli aĝa publiko.

Ĉiu skribas informojn sur sia kajero pri la ebla reta

Eo-lernado.

Mi parolas pri Zamenhof.

Sur tablo estas Esperantaj libroj. Mi malfermas ĉinan verkon kiu entenas etajn poemojn. Ili admiras la bildojn kaj retrovas multe da vortoj lernitaj hieraŭ : suno, flava, ruĝa... divenas novajn : rivero, maro... ktp.

Apud la afiŝo « vojaĝi dank'al tiu lingvo », mi rakontas la plezuron povi komuniki kun multaj eksterlandanoj per ununura lingvo.

La instruistino malkovras la konjugacion, la vortfaradon, kiu ebligas lude krei novajn terminojn. Mi pruntedonas al ŝi librojn.

Sed rapide pasas la tempo ; ni denove diras unu al la alia : « Ĝis revido ! »

La suno brilas sur Belcodène !

*raportis Jeanine Ratouchniak*



*orkestro Diastema*

## **Aups (83)**

### **Konatiĝo**

Klasikmuzika koncerto, proponita de la filharmonia orkestro Diastema, okazis en Aups, la 29an de Januaro, en la urba Kultura Centro Anatole Lambert.

Multe da personoj ĉeestis : ĉiuj sidiloj de la festo-domo estis okupitaj, kaj tiu ne kutima okazaĵo en Aups tre kontentigis la organizantojn !

Nu, kial paroli pri tiu evento, kiu ŝajne ne rilatis kun Esperanto ?

Simple ĉar mi, solsole esperantisto en la urbo Aups, (sola ĝis nun, sed tio povus ŝanĝiĝi, kiu scias ?), havis la plezuron konatiĝi kaj iomete babili kun Maggy Combot, violonistino de la muzika ensemblo kaj ankaŭ esperantistino.

Sed kiel do mi povis ekscii pri la ĉeesto de tiu esperantista muzikistino ?

Respondo evidentas : vi ja bone scias, ke la plej eta kaj malgrava novaĵo rapide distrumpetiĝas en nia rondo, ĉu ne ?

*raportis Gilbert Duval*

## **Solliès-Toucas (83)**

« Mi interesiĝas kunmuziki kun aliaj esperantistoj en sudorienta Francio. Mi violonludas en bandoj por folkloraj baloj (aktuale en 3 bandoj, kiuj dancigas en la regiono PACA).

Ĉu iu havus ideojn por mia projekto aliĝi al bando por (iamaj) internaciaj koncertoj en Esperanta medio ? »

Por kontakto : Françoise Noireau 04 22 44 21 39

## **EKSTERAJ RILATOJ - INFORMADO**

### **Gap (05)**

#### **Artikolo en « Le Dauphiné Libéré »**

Jen la teksto de artikolo aperinta en la loka ĵurnalo « Le Dauphiné Libéré », okaze de la 125a datreveno de la Unua Libro :

*Les espérantophones fêtent un anniversaire*

*Le 26 juillet, les espérantophones du monde entier fêteront le 125<sup>ème</sup> anniversaire de la parution du premier livre en espéranto. Ludovic Zamenhof a écrit ce livre intitulé « La langue universelle » (Unua libro) édité le 26 juillet 1887.*

Ce sont environ 90 personnes qui se sont retrouvées aux Issambres (Var) pour un stage annuel. Bien sûr l'enseignement et le perfectionnement de l'espéranto ont été dispensés, mais ils ont aussi mis leurs idées en commun pour chercher une action pour marquer ce 125<sup>ème</sup> anniversaire.

L'idée retenue est de citer 125 proverbes ou dictons jusqu'à la date anniversaire. Ces proverbes apparaîtront chaque jour sur le site : [esperanto-provence.org](http://esperanto-provence.org). Le départ de l'opération est donc fixé au 23 mars 2012.

Cette adresse sera affichée dans la petite vitrine de l'espéranto Place de la République à Gap (près de la boulangerie la plus proche de la cathédrale).

Le premier proverbe a été proposé par une espérantiste allemande : « Tion, kion Johaneto ne lernas, Johano neniam lernos » (Ce que petit Jean n'apprend pas, Jean ne le fera pas)... et 124 autres citations suivront jusqu'au 26 juillet !

Cet anniversaire sera fêté du 28 juillet au 4 août, à Hanoï (Vietnam) au 97<sup>ème</sup> congrès mondial où sont attendus des milliers de congressistes venus du monde entier. Le Président des espérantistes, Probal Dasgupta, universitaire à Calcutta, son pays, sera présent.

La traduction de l'espéranto est maintenant disponible sur Google. C'est la 64<sup>ème</sup> langue en traduction automatique : une satisfaction pour les espérantistes !

Eble estus bone se kelkaj membroj povus aperigi similan artikolon en siaj regionoj... por ke nia laboro estu pli bone diskonigata...

*informis Monique Arnaud*

## Belcodène (13)

### Ekspozicio ĉe la vilaĝa biblioteko

Loĝanta en Belcodène\*, vilaĝo de la Aubagne-a regiono, mi emis profitigi al miaj samvilaĝanoj mian malkovron de Esperanto kaj sukcesis okazigi en la biblioteko ekspozicion kaj konferencon.

Sekve, la ekspozicimaterialo de Espéranto-France pri la lingva problemo kaj ties justa solvo danke al Esperanto estis videbla dum Februaro.

Informitaj de la monata biblioteka programo kaj de afiŝoj, deko da personoj partoprenis, malgraŭ neĝo kaj frostoj, en konferenco-debato proponita de Renée Triolle, vendredon 3an de Februaro.

La homo, kiu defiis Babelon, kaj kies demarŝo plu aktualas post 125 jaroj, ebligis malfermi diskuton pri la nuna malegaleco rilate la lingvojn.

Fine de la kunveno, amikecplena regalo ebligis pliajn interŝanĝojn.

Intensiva staĝo estas antaŭvidita komence de Julio.

\*La famkonata Eo-periodaĵo « Monato » jam aperigis artikolon pri Belcodène kaj ĝia regiono, rilate la tian senpagan bustransporton.

*informis Jeanine Ratouchniak*



*en la biblioteko de Belcodène*

## La Ciotat (13) : Internaciaj Tagoj

### Tago de la Gepatra Lingvo

Bonŝancaj estas la esperantistoj, kiuj povas distingi inter gepatra, patra kaj patrino lingvo.

Bonŝancaj ili estas ankaŭ ĉar ili konscias pri la malforteco kaj malegaleco de la lingvoj tra la mondo.

Sendepende de sia statuso, lingvo estas duflanka : komunika kaj identeca. Uzi nacian lingvon estas tute maljusta pro la avantaĝoj, kiujn akiras la denaskuloj kaj limigas la mondo-percepton al unuflanka aspekto.

Por defendi kulture diversecon, necesas defendi lingvo-diversecon. Tion stimulas UNESKO, kiu decidis, ke la 21a de Februaro estos la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo.

Espéranto-La Ciotat, kun « le Grand Portique », regule festas la Tagon.

Ankaŭ ĉijare ĝi okazis, lundon la 20an de Februaro je la 18a, ĉe Grand Portique, 18 rue Vignol, en la malnova centro de La Ciotat.

*informis Renée Triolle*

### Internacia Virina Tago

Se ni ne aparte interesiĝas pri porvirina agado, Espéranto-La Ciotat tamen kaptas ĉiujn okazojn aperi inter la agemaj asocioj en La Ciotat.

Kadre de la Internacia Virina Tago, la 8an de Marto en Domo de Asocioj, ĝi havis budon, kiu elstarigis la virinojn-verkistojn (Anna Löwenstein kun prezento de ŝiaj romanoj, ankaŭ de la franca traduko de " La ŝtona urbo" ; Marjorie Boulton, poetino ; Spomenka Štimec, kiu ĵurnalismspirite sed emociplene verkas romanojn, kaj la ĵus forpasinta Eli Urbanová). La ekspoziciejon preparis Loukie. Laŭvice deĵoris kaj informis Michel, Loukie kaj Mireille.

Bela okazo ankaŭ por kolekti subskribojn por la peticio « *espéranto au bac* » ; kolektitaj estis sepdeko.

Per dudekminuta prelegeto, Renée Triolle prezentis "Esperanto kaj ineco"-n : ineco de la gramatiko ; gravaj virinoj en la disvolviĝo de la movado ; virinoj en la movado.



*Eo-budo en la Domo de Asocioj de La Ciotat*

## Solliès-Toucas (83)

### Letero al universitatanino

Jen kopio de letero, kiun mi sendis al Sinjorino Mar-

## Diversaj novaĵoj...

### malgajiga...

Antoinette Guigues, kiun tutcerte multaj el vi konis, i.a. ĉar ŝi partoprenis en pluraj Mediteraneaj Esperanto-Semajnoj en Agay kun sia filino Pascale Voldoire, bedaŭrinde forpasis la 20an de Januaro 2012.

Antoinette naskiĝis en Julio 1913. Ŝiaj gepatroj akceptis Lidia-n Zamenhof en Fréjus-

Saint Raphaël, kiam ŝi venis en Cannes, Nice... por instrui nian lingvon.

Antoinette instruis Esperanton en Aix-les-Bains (hejme, la lastajn jarojn) ĝis 2005.

La membraro de Espéranto-Provence sincere funebras kaj kondolencas.

tine Sagaert, universitata profesorino ĉe « Université du Sud » en Toulon, fakulino pri la franca literaturo de la XXa jarcento :

Madame,

Dans le cadre du Master Langues Littératures et Civilisation Spécialité Imaginaires et genèses littéraires que vous dirigez, j'ai imaginé trouver mention de l'espéranto, langue planifiée riche d'une authentique culture littéraire (en particulier poétique) et qui fête en 2012 ses 125 ans.

Il se trouve que j'utilise l'espéranto tous les jours, c'est la langue maternelle de mes 3 enfants. Je l'ai enseigné à des adultes il y a plus de 15 ans, j'avais créé des cours d'espéranto à la MJC de Briançon.

Si vous souhaitez me rencontrer pour vous informer sur l'espéranto, c'est volontiers que je partagerai ma passion.

J'ai 48 ans, je suis enseignante jeune retraitée, je poursuis en libéral mon activité de rééducatrice pour élèves en difficulté (la rééducation scolaire est à mi-chemin entre la psychopédagogie et la psychothérapie). J'ai participé au tournage de "Glossolalies" d'Érik Bulloz.

Infos sur l'espéranto :

[http://esperanto.net/info/index\\_fr.html](http://esperanto.net/info/index_fr.html)

"Une" biographie d'universitaire :

<http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/philsoc-bio.htm>

Mémoire de sociolinguistique sur les espérantistes/espérantophones :

<http://sebastien.erhard.free.fr/memoire.htm>

Umberto Eco, a réhabilité l'espéranto et les langues construites dans son cours au Collège de France sur le thème de "La recherche de la langue parfaite" qui a fait l'objet d'un ouvrage paru en 1994 chez Le Seuil. Les pages 366 à 380 sont consacrées à l'espéranto.

Sincères salutations

*informis Françoise Noireau*



*Antoinette, fotita en MES-2008*

### kaj pli agrablaj...

L'espéranto est désormais disponible dans le moteur de traduction de Google, devenant ainsi langue de travail mondiale, parmi les 64 autres langues accessibles en ligne depuis le traducteur de Google. De facto, l'espéranto devient donc une langue ordinaire, naturelle... ce qu'elle était déjà pour nous depuis longtemps.

<http://translate.google.fr/?hl=fr&tab=TT#>

*Rappel* : Si vous n'avez toujours pas signé la pé-

tition « espéranto au bac », il est toujours possible de le faire en suivant ce lien :

<http://esperanto-au-bac.fr/>

Un nouveau portail de nouvelles du monde en espéranto vient de naître : Nunonia, que vous pouvez lire en suivant ce lien : [nunonia.com](http://nunonia.com)

Notre fameux PIV (Plena Ilustrita Vortaro) peut maintenant être consulté sur le Net à l'adresse suivante : <http://vortaro.net>

## LA FEDERACIANOJ ESPRIMAS SIN...

### prozpoeme...

#### Malferma letero al Printempo

Bonan tagon, Printempo ! Vi estas nun reveninta de viaj foraj vojaĝoj. Mi scias, ĉar mi hazarde renkontis vin ĉi-matene : vi estis tiel bela, tiel pimpa, kun ĉiuj tiuj floroj sur via ĉapelo, kaj tiuj foliaroj broditaj sur via mantelo ! Vi rigardis min per okuloj plenaj je lumo, ĵus freŝnaskita lumo. Mi estis kortuŝita, impresita. Mi ŝatus formuli al vi simplan demandon de scivolema infano : « Diru al mi, kie vi unue ekaperas ? Ĉu estas en la brizmildeco, en la hirundkanto, en la infanrido, en la arbfoliaro, en la florkoro aŭ en mia poemo ? »

Bedaŭrinde, ne haltante, vi daŭrigis vian vojaĝon. Mi deziris kapti vin, sed vi ŝajnis tiel hastema : vi havis tiom da traveturota distanco por diri al ĉiuj, ke « vintro ĵus demetis sian mantelon el vento, malvarmo kaj pluvo, kaj vestiĝis per brodaĵoj, el lumiga suno, klara kaj bela. »

Printempo, via reveno kvazaŭas balzamon en nia koro ! Ni ege bezonas vin !

Tre kara amika estaĵo, kantata de la poetoj, muzikistoj, pentristoj kaj skulptistoj, via nomo elvokas korbon da ĝojoj kaj ridetoj, plenbrakon da amo kaj espero. Danke al vi, la vivo renaskiĝas, eksplodas, ŝprucas ; la tero radias, kantas, fariĝas dikega bunta bukedo, la vento transportas mildajn kaj delikatajn parfumojn kaj semas ĉien karesojn kaj kisojn. Ĉiujare, ni akceptas vin samemocie, samfeste, samdankeme. Post la vintra torporo, vi penetrigas novajn kaj vivigajn fortojn en nin, por pli bone fronti ĉiujn niajn zorgojn kaj niajn problemojn, vi donas al ni deziron ĉion transformi en la domo, danci, kanti kun la birdoj, nutri niajn okulojn kaj nian koron, por admiri tiujn belaĵojn, kiuj dise-mise disvolviĝas, kaj kiuj regeneras nin.

Kaj tamen bataloj, militoj, perfortoj daŭras, tiel ke mi timas, ke iam vi ne plu volos reveni...

Printempo, vi, magiisto, ĉu vi ne povas semi en la koron de la homoj, la rozon pri Amo, kiu neniam velkos ?

Ĉu la homoj ne kapablas amikiĝi, interkompreniĝi, ami unu la alian ?

*Michèle Freud*

-o-o-o-o-o-o-o-o-

poezie...

En mia ĝardeno

mankas

nur unua flor' ....

sed ci estas

en mia kor'

Bela peonio ,

kiu splendifigas

mian animon

*Anita Collomb*



-o-o-o-o-o-o-o-o-

Limdato por sendo de publikotaĵoj

por la venonta numero :

**15a de Junio 2012**

Bonvolu sendi al : [p.vilain83@orange.fr](mailto:p.vilain83@orange.fr)

Antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj !